BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

CARRERAS I CANDI n-ro 34-36
Telefono. 240 25 62
BARCELONO, Katalunio, Hispanujo

JUNULARA SEKCIO DE BEC

# ĜENERALA INFORMILO

N-ro 74 JULIO 1991

## UNUA ESPERANTISTA RENDEVUO EN MOIA LA 29an DE SEPTEMBRO

Estraranoj de KAE, E-Grupo Moia kaj Kultura Asocio "La Tosca" jam finpreparis la oficialan programon kaj tuj la esperantistaro ricevos la aliĝilon. Barcelona Esperanto-Centro kunlaboros en la Rendevuo organizante la prezentadon de la lasta verko eldonita en Hispanio titolita "ZAMENHOF DOCTOR ESPERANTO"

## SOMERAJ KURSOJ

Dum la monatoj julio kaj septembro (ne en aŭgusto) okazos en nia sidejo en Carreras i Candi 34-36, Somera Esperanto-Kurso, ĉiumarde kaj ĉiumerkrede je la 8a horo ĝis la 9a horo vespere. Ĉiutage okazos prezentado de VIDEOFILMOJ pri la temoj plej aktualaj.

## BARCELONO - SABADELL - VICH

En la tri urboj de Katalunio kie ETA kaŭzis terurajn krimojn, tragedion, doloron, kaj suferon, la popolo, la registaro la politikaj partioj UNUVOĈE KONDAMNIS LA KRIMON KAJ LA UZADON DE LA PERFORTO POR POLITIKAJ CELOJ. Ĉu la esperantistoj ankaŭ partoprenis en la kondamnado ?

## 78a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VALENCIO 1993

La "Generalitat" de Valencio subvencios per 100.000 p-toj la vojaĝon de la provizora prezidanto de la L.K.K. s-ro Augusto Casquero al Norvegio, kie li reprezentos kaj prezentos la la 78an Universalan Kongreson de Esperanto en Valencio, 1993.

Li ankaŭ partoprenos kiel komitatano de UEA en tiu U.K. anstataŭante samideanon Aragaj, kio faboros la rektan defendon de nia kongreso tie.

## OMAĜO AL LA PLEJ GRAVA ELDONISTO EL LA MONDO RÉGULO PÉREZ

En la 51a Hispana Kongreso de Esperanto en la Laguna, okazos omaĝon al la eminenta esperantisto kaj eldonisto s-ro Régulo Pérez.

Certe en Barcelono restos multaj esperantistoj kiuj ankaŭ deziros omaĝi lin, sed ili ne povos ĉeesti la Hispanan Kongreson. Pro tio B.E-C. organizas por la tago 17a de julio (merkrede) je la 8a horo vespere KUNVENO-OMAĜON al s-ro Régulo Pérez

Oni prezentos videobendon pri li kaj oni okazigos paroladon pri lia vivo kaj lia eldona laboro. La estraro atendas vin.